

TEA-BULTENO

14ª JARO **JULIO - AÚGUSTO 2011** **NUMEROJ 7-8**

Se laŭ vivovojo vi deziras ricevi amikecon, dolĉecon kaj poezion, kunportu ilin ĉiam kun vi mem.
Georges Duhamel (1884-1966 - franca verkisto kaj kuracisto)

Antaŭferia saluto!

Supozeble vi jam decidis, kien iri dum via libertempa periodo, eble vi jam estas foririnta kaj legos ĉi vortojn nur je post rehejmiĝo, aŭ ankoraŭ sopiras pri viaj baldaŭaj ferioj. Ĉiaokaze, memoru, ke, je via reveno, ni ŝatus scii, ĉu ankaŭ ĉijare vi vizitis iun renkontiĝon, aŭ kongreson, aŭ seminarion en nia vasta Esperantujo. Ĉu vi daŭre utiligas la eblojn donitajn de la uzado de Esperanto? Espereble ke jes, do, jam nun mi atendas viajn raportojn, impresojn pri travivaĵoj, spertoj faritaj pere de nia kara lingvo.

Malgraŭ ke, pli kaj pli, aperas evidentaj signoj kaj signaloj de profunda krizo ene de lokaj societoj, tamen mi varme esperas, ke la ioma pesimismo, kiun mi sentas enkore, rilate ankaŭ nian estonton, dissolviĝu en baldaŭa tempo, kiel neĝo fandiĝas sub la varmaj sunradioj *(nu, mi pensas pri neĝo, ĉar ĝuste en ĉi tiu momento, kiam mi estas skribanta ĉi vortojn por la enkonduka mesaĝo de via TEA-Bulteno, mi estas, gut-post-gute, likviĝanta sur mia antaŭekrana seĝo)* kaj ke ĝin malaperigos ĝuste vi, kiuj - post entuziasmigaj, ekzaltigaj, emocifajraj, spicaj personaj konstatoj pri la senlima valoro de Esperanto - rekomencos kune kun ni pli energian aktivadon ene de via Asocio, kiu vin ĉiujn bezonas por plue vivadi.

Nun vi vojaĝadu, distriĝu, ripozu, plenfortiĝu, ĉar jam ekde septembro estos bezonata via helpo, unue por startigi unua- kaj dua-gradajn kursojn, kaj due, pro venontjara tre grava defio: ni kunlaboros por evento tute eksterordinara, en kiu Esperanto havos rolon egalan kaj samrangan al ĉiuj aliaj lingvoj. Temas pri elstara projekto, enkadre de Europ-unio, por kies realigo necesas plena engaĝiĝo de ĉiuj vi. Jam vendredon la 2an de septembro, ekde la 19ª horo, ni atendas vin en TEA-sidejo por plani kaj programi nian estontecon!
Bonan somerumadon al ĉiuj kaj ĝis la revido en septembro! *Via redaktanto Elda*

Karstaj Tagoj

Triestaj Tagoj

En kiu ajn momento de la jaro ni organizas, ekde 2 gis 5 tagoj, restadojn en Triesto kaj ties provinco, por grupoj de minimume 4 personoj ĝis 15, por familioj kun infanoj, por junuloj kaj plenkreskuloj. Ni ofertas "turisman kompleton", inkluzivantan ĉiujn kostojn de tranoktoj, manĝoj, transportoj, enirbiletoj al muzeoj... Petu informojn poŝte al Triesta Esperanto-Asocio, Via Coroneo 15, It-34133 Trieste, Italio, aŭ rete al:
esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it

BALDAŬ EBLOS RICEVI INFORMOJN PRI AŬTUNAJ KARSTAJ TAGOJ, EN SEPTEMBRO 2011!

Itineroj en la triesta provinco: la Karsto

Esplorado de la altebenaĵo:
- Fortikaĵo de Monrupino
- Val Rosandra
- La grotoj
- La Karsta domo
- La pravilaĝoj
- Botanika Ĝardeno "La Carsiana"
- Naturaj padoj en Karsto...

La Kasteloj

- Kastelo Sankta Justo
- Kastelo Miramare
- Kastelo en Duino
- Kastelo en Muggia

Kion alian viziti en la urbo?

Itineroj tra la urbo

Itinero Arkitektura, rigardante la triestajn palacojn neoklasikajn, florstilajn ...

Itinero Religia por konatiĝi kun la diverseco reprezentata de la Preĝejoj: katolikaj, serbo-ortodoksa, greko-ortodoksa, evangelia, hebrea, protestanta ...

Itinero Literatura: sekvante la spurojn de James Joyce ...


Diru viajn preferojn kaj ni organizos!

La Muzeoj

Muzeo Revoltella kaj galerio pri moderna arto; Muzeo Sartorio, kolekto de artaĵoj kunigitaj de tiu fama mecenata familio; Muzeo Morpurgo, loĝejo de Familio, el la 2ª duono de 1800; Teatra Muzeo "C. Schmidl"; Muzeo pri Orienta Arto; Muzeo pri Historio kaj Arto... kaj multaj aliaj!

Laste trovitaj!

Ĉi foje, mi prezentas al vi interesan dokumenton, adresitan al Amerigo Luigi Reni, de la Organiza Komitato de la 10ª Pariza UK, 1914. Temas pri la provizora karto, kiun li estus devinta transdoni al la Akceptejo



je sia alveno en la franca ĉefurbo, por ricevi la definitivan kongreskarton. Kiel sciate, la kongreso ne okazis - aŭ pli bone okazis nur la "Malfermo" - pro la militeksplodo.

Sed kiu estis Amerigo Luigi Reni? Naskita en 1880 en Milano, li ellernis Esperanton en 1907 kaj tuj komencis sian disvastigan kaj instruan agadon en Verono, en kies provinco li laboris kiel vicdirektoro de fervojoj kaj tramvojoj. Li fondis, en 1911, la Veronan Esperanto-Grupon kune kun adv. Attilio Vaona kaj en tiu sama jaro organizis Esperanto-Konferencon, dum en 1912 li partoprenis en la organizado de la 2ª Itala Kongreso. Post la deviga halto de ĉia aktivado favore al Esperanto pro la unua mondmilito, kiu interalie malpermesis al li, kvankam jam aliĝinta (kaj pri tio atestas la supra 'provizora karto'), ĉeesti la 10an UK-on en Parizo, li reaktiviĝis kaj kune kun adv. Vaona kaj prof. Umberto Toschi eĉ estris la Italan Esperanto-Federacion, kiu havis sian sidejon en Verona dum trideko da jaroj. Amerigo Reni tradukis "Itala Laborĉarto"-n, pri kiu, en 1928-30, li zorgis la dissendon de ĉ. 1800 ekzempleroj. Ĝis sia morto, en 1957, li gvidis kursojn kaj diversmaniere kontribuis al vigligo de la kluba aktivado kaj al disvastigado de la lingvo; interalie li estis, ekde 1943 ĝis 1957, sekretario de UECI, la itala sekcio de IKUE, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Ho, mi aldonas kuriozaĵon, tre interesan precipe nunatempe: la karto estis sendita de Parizo la 2an de februaro 1914 kaj alvenis en Verona la 3an de februaro 1914! Pasintan monaton atingis min, je la 6ª de junio, rekomendita letero, kiu estis sendita je la 26ª de majo 2011 de Massa Carrara (centra Italujo)!!! Ne bezonatas komento, ĉu ne?

Sed ni daŭrigu trafoliumi la poŝtkartan albumon pri laste akiritaj esperantaĵoj kaj rigardu tiun ĉi tre interesan fotokarton. Ĝin sendis al samideano Giuseppe Calza



(*Genova* - Italujo), septembre 1912, s-ro Nikolau Emil, el Bukareŝto (Rumanujo). Esperantisto ekde la jaro 1907ª, li estis tiam vicprezidanto de la Rumana Esperanto-Societo, vigla aganto, verkinto de gramatiko kaj redaktanto de loka gazeto. La foto estis farita meze de aŭgusto, kiam la tiutempa UEA-prezidanto, s-ro Harold Bolingbroke-Mudie, kune kun aliaj kvin angloj vizitis la Rumanan Societon. En la foto, dekstre, staras s-ro Nikolau, meze sidas, elegante kaj blanke vestita, s-ro Mudie; je lia dekstra flanko, lia patrino. La angloj estas signitaj per ★. Sur ĉapo - aŭ eble pli bone dirite - sur la prezidanta kasketo, klare videblas la kvinpinta Esperanta stelo. Pendas de la seĝo de lia patrino nia flago. Do, grava aŭtoritato estis la gasto de la rumana esperantistaro.

Sekve, nun, ni iom konatiĝu kun la UNUA prezidanto de UEA. Li naskiĝis 1880 en Stighgate-Londono kaj mortis januare 1916. Profesie li estis borsisto. Li esperantistiĝis en 1902, leginte pri Esperanto en *The Review of Reviews.* En novembro 1903 li fondis gazeton *The Esperantist,* danke al financa garantio de William Thomas Stead[1)]. La gazeto tamen liveris ne perdon, sed profiton. Kiam *The Esperantist* kunfandiĝis kun *The British Esperantist* en januaro 1906, li aliĝis al ties redakta komitato. Li multe laboris por la eldono de la 'Nova Testamento' en Esperanto.



Karikaturo de Harold Brolingbroke-Mudie farita de Jean Robert

Li faris, propagandcele, multe da alilandaj vojaĝoj kaj vizitis ok Universalajn Kongresojn. Mudie estis unu el la 'Trio por la Tria' (3ª UK en Kambriĝo, Anglujo). Li fariĝis unue vicprezidanto, poste (de 1912 ĝis 1916) prezidanto de Brita Esperanto-Asocio. Intertempe, en 1908, oni elektis lin kiel prezidanton de la ĵus fondita UEA. Eduard Stettler[2)] nomis lin "naskita prezidanto" pro liaj retorikaj kapabloj. Li estis membro de la Lingva Komitato. Mudie, post komenco de la Unua mondmilito, aliĝis al la armeo, en kiu li faris rapidan karieron. En januaro 1916, tre frutempe, kapitano Mudie bedaŭrinde mortis pro aŭtomobila akcidento en Francio.

Notindas, ke nur post tri jaroj, en 1919, oni elektis novan UEA-prezidanton, nome la antaŭan vicprezidanton Hector Hodler.

En tre skiza formo, sciigoj pri tre gravaj esperantistoj, elstare agintaj por Esperanto kaj potencigo de E-movado.

[1)] **William Thomas Stead** – *brita filantropo, ĵurnalisto, pacifisto kaj direktoro de la ĵurnalo* The Review of Reviews*, de li fondita. Li estis pioniro pri enket-ĵurnalismo. Li ludis gravan rolon en tiu kampo kaj ĉefe celis demontri, kiom presaĵoj povas influi la publikan opinion kaj politikon de la regsistemo. Li estis tre konata subtenanto de tutmonda paco, de rajtoj de la virinoj, defendanto de civilaj liberecoj kaj batalanto favore al bezonuloj kaj subprematoj kaj kontraŭ koruptado de neplenaĝuloj. Stead esperantistiĝis pro parolado de prof-ro Hartman en Leipzigo. Ekde tiam en sia ĵurnalo li energie propagandis pri Esperanto per ĉiumonata paĝo*

Daŭrigo je paĝo 3ª

Uscito il libro "L'amore e l'ameba" di Baldur Ragnarsson, in esperanto, tradotto in italiano da Nicolino Rossi.



È appena uscito per le Edizioni Eva, nella collana "Stella verde - Testi a fronte", il volume di poesie "L'amore e l'ameba" (Ed. Eva, Venafro 2011, pp. 28, € 12,00), nella traduzione di Nicolino Rossi e con testo originale in esperanto a fronte.

Baldur Ragnarsson (Reykjavík 1930) è uno dei maggiori poeti esperantisti ed è la prima volta che viene tradotto in italiano. È stato insegnante ed ispettore scolastico. È membro dell'associazione degli scrittori esperantofoni (ALE, Akademio Literatura de Esperanto, che continua il lavoro di EVA, Esperantlingva Verkista Asocio, dal 2008) e dell'Unione degli Scrittori d'Islanda. Dal 1979 è membro dell'Accademia dell'Esperanto e fu redattore di "Norda Prismo" (1958-1974). Esperantista dal 1949, è attivo nel movimento locale e internazionale dal 1952. Tra le sue numerose pubblicazioni, citiamo le raccolte di poesie in esperanto *"Ŝtupoj sen nomo"* (Gradini senza nome, 1959), *"Esploroj"* (Esplorazioni, 1974), *"La lingvo serena"* (La lingua serena, 2007), *"La neceso akceptebla"* (La necessità accettabile, 2008).

Segnala, tra l'altro, Nicolino Rossi nell'acuta prefazione: *"In generale, la poesia di Baldur Ragnarsson tende alla fattualità, evitando un lirismo troppo romantico, cercando di esprimere il concreto attraverso vie oblique dell'indagine mentale, sposate con l'emozione di un cuore pulsante. I risultati di una tale poetica sono spesso di un'incredibile freschezza stilistica ed innovazione espressiva. Mi sembra che anche questo breve ciclo evidenzi tali caratteristiche."*

L'esperanto si dimostra ancora una volta una lingua diffusa e viva.

---

al ĝi dediĉita. Li mortis, 63-jara, pro submariĝo de la ŝipo Titanic*.*

[2] **Eduard Stettler -** *naskiĝis en Bern, 1880. Li studis juron, sociologion, komercon, muzikon kaj librotenadon. En 1908 li eklernis Esperanton kaj la sekvan jaron aliĝis al UEA. De Berno li translokiĝis al Ĝenevo en 1910 por labori, dum du jaroj, volontule en la oficejo de UEA. Kune kun Hector Hodler, li laboris por plifortigi la strukturon de la movado kaj, enen de UEA, li klopodis enporti siajn spertojn, faritajn en aliaj societoj, kun kiuj libervole li kunlaboris. Li strebis kaj sukcesis konkretigi ĉion kio ŝajnis farebla: liaj raportoj, bedaŭrinde legataj nur de malplimulto en la movado, ankoraŭ nun estas fonto de utilaj pensoj, spertoj kaj observoj. Stettler estis vicdelegito de UEA en Berno ĝis 1910, komitatano de UEA, poste vicdirektoro ĝis 1919, direktoro kaj, fine, prezidanto de la Asocio de 1920 ĝis 1924. La komitato elektis lin honora prezidanto en 1924, kiam, pro lia grava malsano, d-ro Privat akceptis la prezidantecon. Reelektita en 1928, li tamen rezignis sian oficon en Stockholm (1934) pro solidareco al kunlaborantoj – Edmond Privat kaj Andreo Cseh - ne elektitaj en la novan komitaton de la Asocio. Li verkis la statutojn de UEA de 1920 kaj 1934, biografion de Hodler, kaj, krom kelkaj literaturaj tradukoj, grandan nombron de priaferaj artikoloj en la gazeto ‚Esperanto'. Li mortis en 1940 en Berno.*



ĴUS APERINTA LEG-INDAĴO KAJ JAM FURORE LEGENDA!

Ĝin aŭtoras Eŭgeno de Zilah, tre konata esperantisto kiu, kune kun sia edzino Magdalena, bedaŭrinde forpasinta la 27[an] de novembro 2009, fondis en 1985, kaj daŭre redaktoras, la mondkulturan sendependan revuon LA GAZETO, kies ĉefa celo estas prezenti ĉiajn aspekton kaj formon de civilizacioj, civilizoj kaj kulturoj. Elstare li verkis sennombrajn artikolojn kaj eseojn pri filozofio, arthistorio ktp, ne nur por LG sed ankaŭ por Monato, Esperanto, Literatura Foiro k.a. Aliaj liaj originalaj libroj estas: "Vivi sur barko" (1985) kaj "Kaj kiu pravas" (2002).

El lia lerta plumo ĵus eliĝis vere eksterordinara verko, kies legado donas nekompareblan plezuron, pro neordinara enhavo, profundaj analizoj de homaj mensoj kaj pensoj, vortuzado ĉiam trafa kaj facile interpretebla kaj - nelaste - tre ĝuinda stilo. Ĝin legante, oni perdiĝas en la interplekto de la romana intrigo, el kiu eblas malimplikiĝi nur post atingo de la lasta vorto: FINO. Sen Rodin tiele ĝin komentis: *"Mi legis, admiris, konfirmiĝis en mia unua impreso pri la rakontotekniko, scenvicigo, takto, tempoinstinkto... unuvorte la stilo. Unu el la plej perfekte (metie) ellaboritaj, de mi iam ajn franditaj, sendepende de la uzata ilo."*

"La Princo ĉe la Hunoj" estas la rakonto pri la huniĝo de ĉina aristokrato, pri malfacila adaptiĝo de talenta individuo al alia civilizo, al aliaj homoj, moroj, gustoj kaj odoroj. La tuto disvolviĝas en la dua duono de la 3-a jarcento aK:

Imperiestro Qin Shi Huangdi, reĝo de Qin, lanĉas siajn armeojn kontraŭ la najbaraj reĝlandoj. En ~256 la reĝlando Zhou estas okupita; en ~230 la reĝlando Han; en ~228, la Zhao; en ~225 venis la vico de Wei.

La maljuna reĝo de Wei devigas sian filon Chan, la ĉefkomandanton de la armeoj de Wei, al akcepto de senespera fronta batalo. Venkita, princo Chan fuĝas kun sia huna kavalerio en Chu-landon. Post malvenko en Chu (~223), la kavalerio de la Princo daŭrigas la rezistadon en Yan, kiu falas post unujara batalado. Du jarojn poste la tuta Ĉinio apartenas al la Qin.

La princo Chan sin kaŝas, dum sep jaroj, en taoisma monakejo meze de neatingeblaj montaroj. Sed fariĝi taoisma saĝulo ne estis lia destino; li ne kapablas submetiĝi al la malamata Qin. Li decidas forlasi la ĉinan teron kaj komenci novan vivon ĉe la hunoj.

Eldonita de Mondial, la 620-paĝa libro estas aĉetebla ĉe la reta librovendejo de Mondial, UEA, La Gazeto. Informoj pri ĝi facile troveblas rete.

NE FORGESU KE:

sabaton la 23[an] de julio, ekde la 18[a] horo, Anita atendas vin ĉiujn ĉe sia hejmo. En bela naturo, antaŭ mirinda panoramo, ni kunestados plezure, por amika interbabilado, kuna manĝado kaj trinkado, diskutado peresperanta, ktp ktp. Kontaktu min aŭ Edvige-n por organizi la veturadon!

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Ĉu vi ŝatis la unuan parton de "Paronimoj" sur la antaŭa BULTENO? Ĉu ĝi helpis vin klarigi eblajn dubojn aŭ eltrovi nekonatajn signifojn?
Do, VIGLO pretigis por vi kroman liston, dezirante profitigan prikonsideron.

Bramano pastro de hinduismo
Brahmo nepersona unuecprincipo de la mondo
Brahmao la krea eternulo en la hindua diotriopo
Brahmoo monoteisto ano de la hinduismoreforma movado
Bramo *(Zo)* ciprinoforma fiŝo; parto de masto
Brano grenŝelo apartigita de faruno

Branĉo tigo, ŝoso kreskanta el trunko; fako
Branko spirorgano de fiŝoj
Brankardo portilo por malsanuloj

Brecĉo fendego en muro; trarompaĵo
Brecĉio sedimenta, klasta petro
Breto tabulo aŭ plato

Brigo dumasta ŝipo
Briĝo 52-karta ludo
Briko konstrumaterialo el bakita argilo

Brodi kudre ornami teksaĵon
Brogi trempi aŭ ĵeti en bolantan akvon
Broki brodteksi fadenojn tra silka ŝtofo

Budeno sangokolbaso
Budho fondinto de budhismo
Budito *(Zo)* flava motacilo *(*G.*Motacilla)*
Budo provizora ligna butiko

Bufedo verŝotablo ĉe stardrinkejo
Bufo besto simila al rano
Bufono misforma spritulo ĉe kortego

Bukano viando aŭ fiŝo fumsekigita
Buklo volviĝanta harfasketo
Buko metala kadreto kun movebla pinglo por fiksi zonon ktp
Bulko malgranda bakaĵo

Buleo Papa dekreto
Bulo globforma peco
Bullo buleo; *(Md)* blazo granddimensia

Cedrato frukto de cedratujo *(Citrus medica)*
Cedro konifera arbo *(Cedrus)*
Cidaro mitro de juda ĉefpastro; turbano de persaj reĝoj
Cidro trinkaĵo el pomsuko
Cindro restaĵo de brulinta objekto

Cefalo *(Md)* kapo (en kunmetaĵoj ĉe teknikaj vortoj)
Cefaleo potenca kapdoloro
Cefeo *(As)* boreala konstelacio

Celo objekto kiun oni penas trafi
Ĉeleo geologia periodo
Ĉelo monaĥeja, mallibereja ĉambreto; sesflanka kaveto el vakso en abelujo; malgranda vivunuo
Ĉielo blua spaco super nia kapo

Cendo centono de dolaro, guldeno aŭ eŭro
Cento la nombro 100

Cenzuro kritika kontrolo de presaĵoj
Cezuro paŭzeto ĉe difinita loko en versoj

Cerbo nervosistemo en la kranio
Cervo sovaĝa remaĉanta mamulo

Cigaredo tranĉita tabako envolvita en paper-eto
Cigareto malgranda cigaro
Cigaro longforma kunvolvaĵo de tabakfolioj

Cikado muzikanta hemiptera insekto
Cikaso palmospeco
Cikatro postsigno de resaniĝinta vundo

Ciklo regula sinsekvo de samaj fenome-noj; aro da samtemaj poemoj
Ciklono kirla uragano

Cipreo konko
Cipreso piramidforma konifera arbo
Cipriano virnomo
Ciprino *(Zo)* dolĉakvaj fiŝoj *(*G. *Cyprinus)*
Cipro insulo en Mediteraneo

Cirkelo dubranĉa ilo por desegni cirklojn
Cirklo geometria ronda linio
Cirko rondforma fermita loko por spektakloj ks
Cirkulero cirkulanta avizletero
Cirkuli rondire moviĝi
Cirkuo *(Zo)* birdo similanta al akcipitro *(*G. *Circus)*
Cirkvito la vojo laŭ kiu kurento povas cirkuli

Ciro ŝuŝmiraĵo
Ciruso maldensaj nuboj aspektantaj kiel plumaro

Cisto natura veziko en la korpo; arbedo *(*G. *Cistus)*
Kisto iaspeca tumoro

Citralo aldehido de geraniolo
Citro malnova muzikinstrumento
Citrolo *(Bo)* herboj el kukurbacoj *(*G. C*itrullus)* enhavantaj akvomelonon.
Citrono flava subtropika frukto
Citruso arbo el rutacoj *(*G. *Citrus)*

Cizelilo ŝtala stangeto uzata por enpremi metal-surfacon
Ĉizilo ŝtala ilo por tranĉi malmolan blokon

Ĉamo sovaĝa antilopo
Ĉano parto de pafilo
Ŝamo preparita ledo de ĉamo

Ĉako alta kapvesto uzata en armeoj
Ĉapelo kapvesto kun cirkaŭrando
Ĉapo mola kapkovrileto senranda; analogforma peco en tekniko
Kapo korpoparto; plej alta parto de objek-to ktp

Ĉarto mezepoka dokumento
Karto kartonfolio; mapo

Ĉasi persekuti bestojn
Ĉesi komenci ne esti

Damao besto simila al cervo
Damo nobela sinjorino; figuro ĉe ŝako k.a.



La Halebardo de Triesto

Por ĉiuj triestanoj la urba emblemo estas de ĉiam konata.

Plejofte ĝi bele elstariĝas surfone de la Triesta ruĝa flago kaj, tie kaj tie, dise en nia urbo, troveblas sur afiŝoj de kulturaj eventoj, reliefe sur monumentoj aŭ publikaj fontanoj, sur la stangoj de publika lumigado, ĉe la ŝildoj de sportaj asocioj k.s. Triestanoj, ĝin ekvidante, kutime kortuŝiĝas: tiu blanko sur ruĝo por ni estas hejmeca, identiga elemento de nia vivo, tute 'natura' simbolo de nia urbo ekde ... ĉiam!

Ĉu egale konata estas ĝia historio? Ekde kiam aperas spuroj pri ties origino?

Helpas nin la historiisto *Pietro Kandler* en sia manuskripto de 1861. Li priskribas la unuan prezenton de la halebardo en unu el tri moneroj, stampigitaj, inter 1237 kaj 1253, de la triesta episkopo *Volrico de Portis*: tie klare distingiĝas la halebardo surpinte de la stango kun la urba standardo. La simbolo aperas ankaŭ en sekvaj moneroj, kiujn stampigis, dum 13ª kaj 14ª jarcentoj, Patriarkoj *Raimondo* kaj *Pagano della Torre*. Denove eblas rimarki la halebardon en la dekkvarjarcenta sigelo – kiun la Triesta Komunumo uzadis ĝis la 16ª jarcento – kie videblas du halebardoj kun flamforma flago eliranta el la muregoj.

Oficiale – per pergameno datita la 22ªn de februaro 1464 – la habsburga imperiestro *Friedrich* la tria, permesis al la "lojalegaj" triestanoj uzadi ŝildon kie, sub la dukapa aglo, ora halebardo elstaras sur la ruĝa-blanka-ruĝa flago de la Aŭstria Duklando. Tia ŝildo eĉ nun videblas fandita en kelkaj stratlampoj.

Sed legendo interligas la halebardon kun Sankta Serĝo, reire al la 3ª jarcento. Serĝo estis romia oficiro, rezidinta ĉe la 15-a legio en Triesto, kie li konvertiĝis al kristanismo. Oni rakontas, ke la 7ªn de oktobro 289, samtage de lia senkapiĝo tre fore en Sirio, halebardo falis el la sennuba ĉielo kaj enpikiĝis en la ĉefa urba placo, ĉe la romia Forumo. Tiu ĉi "signo de la ĉielo", kaze de martiriĝo, estis de li promesita al siaj triestaj kunfratoj, kiam li forveturis al Romo. Ĉe la trezoro de la triesta Katedralo gardiĝas, kiel relikvo, pinto de halebardo, tradicie identigita kun tiu de Sankta Serĝo, eĉ se probable ĝi estas posta farado.

Do, ĉu la armilo de Sankta Serĝo estis vera halebardo? Tia vorto devenas el la mezepoka germana *'helmbarte'*, kunmetita el *'helm'* (helmo) kaj *'barte'* (adzo, hakilo), do, 'adzo por helmoj'.

La halebardo de Serĝo plivere similas al alia stango-armilo, nomita *'corsesca'*, kiu havas longan pinton kun ĉebaze du arkformaj aloj, prefere akrigitaj, por tratranĉi la poplitojn de ĉevaloj, cele al elseligo de l' kavaliroj. Eble helpas alia etimologio, kiu devenigas la vorton el la araba *'el-harbet'*, kiel en malnova Sirio nomiĝis speco de lanco kaj tio memorigas nin, ke la martiriĝo de Serĝo okazis, ja ĝuste, en Sirio.

Certe ankaŭ tia legendo favoris pludaŭrigi la historion, tra jarcentoj, de la triesta halebardo, kaj restigi ĝin, kun sia simpla, svelta, harmonia bildo, identigila simbolo de Triesto.

Por ni ĉiuj. *VIGLO*

78ª Itala Kongreso en Torino 20-26 aŭgusto 2011

Multas la kialoj por decidi alvojaĝi Torinon:

- por la aranĝo, kiu pli kaj pli internaciiĝas,
- por viziti belegan urbon kaj interesegan ĉirkaŭaĵon;
- por celebri la 150-an datrevenon de unuiĝo de Italujo;
- por la seminarioj. Ĉi jare unu el la Seminarioj ricevis Eŭropan subvencion enkadre de projekto Grundtvig, tiel ke eksterlandaj partoprenantoj ricevos rabaton en loĝado (detaloj ĉe http://seminario.esperanto.it);
- por ekzamenoj KER;
- por nombraj kursoj, prelegoj, ekskursoj, koncertoj, teatraĵoj, entute riĉa programaro kultura, instrua kaj distra;
- por la kongresejo, situanta en belega, komforta vilao (4-stela) kun parko, sur monteto apud la urbocentro;
- por ne perdi unikan oportunon!

Pluajn informojn ĉerpu el la jenaj retejoj:
http://kongreso.esperanto.it aŭ
http://italakongreso.esperantoitalia.it

Oni atendas vin en TORINO!

Kastelo Greziljono preparas por VI!

Julio-17/23: Seminario kun prelegoj pri lingvo kaj edukado. Intensaj E-kursoj kaj FEI-ekzamenoj
Julio-23/30: Alternativa semajno (ekologio, kuracmetodoj, verda turismo).
Julio-30/aŭgusto-06: Turisma semajno. Kursoj de franca lingvo kaj Esperanto matene. Ekskursoj al Luar-kasteloj posttagmeze.
Aŭgusto-08/15: Junulara internacia renkonto FESTO kun muzika Festivalo, organizata de JEFO
Aŭgusto-15/24: Festa semajno por infanoj, junuloj, familioj. Muziko, gitaro, sporto, ludoj, artumado kaj E-kurso
Julio-22 kaj -31 je 20h30: Muzika prezento de kantoj E-igitaj el itala kaj angla lingvoj: Manŭel - Emanuele Rovere, Italujo
Konsultu plu
Jara agendo: http://gresillon.org/spip.php?rubrique2
Somera programo:http://gresillon.org/spip.php?rubrique8
Kursoj kaj instruantoj:
http://gresillon.org/spip.php?article76
Aktivaĵoj kaj animantoj:
http://gresillon.org/spip.php?article71
Aliĝilo: http://gresillon.org/spip.php?rubrique21
Tarifoj: http://gresillon.org/spip.php?rubrique15

Internacia Esperanto-Tago

Esperanto 'Twitter' Tago okazos je la 26ª de julio, la datreveno de la lanĉo de la "Unua Libro". Ni esperas ke vi povos partopreni – se jes bonvole pepu je tiu tago, kaj marku per # "Esperanto"-n.
La celo estas antaŭenigi Esperanton reklamcele.
Detaloj jenas ĉi-tie http://www.facebook.com/event.php?eid=207181359294030
Espereble iuj el Italio povos partopreni! Bonvole ankaŭ informu viajn alilandajn amikojn!

DIVENLUDO

SOPIROJ



Tiel la vivo, mallonge!
Adiaŭ,
memoroj de plezure
brula buŝo,
pro arda pasio.
Adiaŭ!
Rande de l' nenio,
ne plu por mi filtriĝas
la vivoenflaro,
nur restas nun al mi
la lasta ripozejo.

CERBOTIKLILO

Kiu el la sekvaj kvin multiplikoj estas "enŝteliĝinta", laŭ determinota logika kriterio?

a) 35 x 22
b) 45 x 12
c) 66 x 9
d) 73 x 8
e) 24 x 19

STRANGA AFERO

Oni ĝin konsideras
tro delikata.
Fakte, tiklite,
subite flamiĝas.

Sub la suno, sur plaĝo, sur herbejo, en montaro, ĝuante nenifaradon, amuziĝu solvante ĉi ĉarmajn ludetojn de nia Viglo.

Premion ricevos la plej lerta!

SOLVO de la Ludo de Viglo,
publikigita en TEA-Bulteno majo-junio

La serĉata numero estas 11

Fakte, en ĉiu sinsekvo la dua numero rezultas el la sumo de la unua plus 2, kaj la tria el kroma sumo de 4.

Do: 3 + 2 = 5 + 4 = 9
2 + 2 = 4 + 4 = 8
.....
9 + 2 = 11 + 4 = 15

La redaktanton atingis pluraj korektaj solvoj, tial sekve de lotumado rezultis gajninto, s-ino Galja Nikolova el Sliven, Bulgario. Ŝi ricevos esperantlingvan libreton pri la Kastelo de Miramare, Triesto.

Gratulojn al ĉiuj solvintoj kaj al la bonŝanculino!

Rido sanigas

Anekdoto el Ruslando

En la rusuja militakademio oni prelegas pri la temo "Strategiaj problemoj de la Tria mondmilito". Fine la generalo-preleganto petas demandojn.

Unu oficiro demandas: "Se okazos la Tria mondmilito, kiu estos nia plej verŝajna malamiko?"

La generalo: "Plej verŝajne tio estos Ĉinujo."

Ĉiuj aŭskultantoj estas ŝokitaj: "Kion do ni faru? Ĉinujo havas 1,500 milionojn da loĝantoj, sed Rusujo nur 140!"

La generalo: "En la milito gravas ne kvanto, sed kvalito. Jen, vidu: 5 milionoj da judoj sukcese kontraŭstaras 50 milionojn da araboj."

La oficiro, post iom da medito, demandas: "Tamen, ĉu ni havas sufiĉan kvanton da judoj?"

Konkurantino de la edzino

- "Izako, se mi mortos, ĉu vi denove edziĝos?", demandas la tre malsana Rebeka.
– "Jes, kara."
– "Oh... Kaj ĉu via nova edzino loĝos en mia domo?"
– "Jes, kara."
– "Oh... Kaj ĉu ŝi dormos en mia lito?"
– "Jes, kara. En via lito."
- "Oh... Kaj ĉu ŝi vestos sin per mia bela ruĝa mantelo?
– "Ne, ne. Ŝi estas multe pli svelta, ol vi."

Scivolemo

Okazis antaŭ multaj jaroj. En Moskvo Rabinoviĉ eniras manĝaĵ-vendejon kaj demandas:
- "Kiom kostas la ŝinko?"
Ricevinte la respondon, li eliras kaj tuj ekas fulmotondro. Forta fulmo batas arbon apud Rabinoviĉ.
Li levas la kapon al la ĉielo kaj paceme diras:
- "Nu, ĉu mi eĉ interesiĝi ne rajtas?"

Pli bone ne scipovi skribi...

Amiko demandis miliardulon: "Kiel povas esti, ke vi ne scipovas skribi anglalingve, kaj tamen fariĝis miliardulo?" Respondis la miliardulo: "Kiam mi antaŭ 40 jaroj venis al Usono el Pollando, mi iris al kelkaj sinagogoj kaj petis laboron kiel pedelo. Sed nenie oni akceptis min, ĉar mi ne scipovis skribi angle. Do, mi komencis okupiĝi pri aĉeto kaj vendo de vrakoj kaj tiel - dum la jaroj - mi iĝis granda komercisto, poste milionulo kaj fine miliardulo. Imagu, do, se mi estus reginta la skribadon de la angla? Mi ankoraŭ estus pedelo en sinagogo..."

Listo de Amantoj de judaj humuraĵoj

Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos **vendredon la 2ª de septembro, je la 19ª horo**. Tuj oni devos ekpropagandi pri kursoj: fakte, startos unua- kaj dua-gradaj kursoj en oktobro; due - tre grave! - oni priparolos la eventon okazontan en majo 2012. Sed ne nur laboroj: enprogramitaj estos pluraj prezentoj pri vojaĝo en Ĉinio kaj partopreno en aliaj E-aranĝoj, prelegoj pri Esperantaj historio kaj kulturo k.a. Plej probable, se estos interesatoj, ni denove planas renkontiĝon dum mardaj posttagmezoj por ekzercadi nian lingvon, konversacii, priparoli Esperanto-verkistojn, legi artikolojn el nia gazetaro ktp. Antaŭviditaj ankaŭ komunaj vizitoj de muzeoj/ekspozicioj kaj ekskursoj en nia Karsto. Ĝis la revido je la 2ª de septembro: ni atendas vin multnombrajn kaj, intertempe, bonan somerumadon!

Esperanto ĉe Alirprogramoj de RADIO UNO

La 11an de julio kaj 10an de aŭgusto, je ĉ. la 14h30, eblos aŭskulti, respektive, intervjuon kun la juna esperantisto Fabio Bettani kaj lastajn novaĵojn el la Esperanto-mondo!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349